

# Svisa Esperanto-Societo informas

1998 numero 5a: novembro / decembro

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

☎ ĉe C.D.E.L.I.: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29; indiki: por Claude Gacond

## Vivo de SES

Bruno Graf kontaktis en Berno la sekretariojn de la Svisa UNESKO-Komisiono cele al adekvata informado. Li aludis, ke UEA havas konsultan statuson ĉe UNESKO. La buroo (s-ino Viviani, adjointe) estis informita kaj rekomendis, ke ni sendu informojn aŭ dokumentojn pri esperanto al la prezidanto de la komisiono kaj al la kultura kaj eduka sekcioj. S-ino Viviani proponis transsendi la dokumentojn per la interna kanalo. Ŝi supozas, ke precipe interesata estus s-ino Rita Cathomas-Bearth, Brunngasse 4, 8001 Zürich. ☎ 01 251 23 72. Ŝi estas la edzino de la nova direktoro de la fondumo *Pro Helvetia*.

Estus bone, ke la lokaj kaj fakaj asocioj ankaŭ sendu informojn pri

siaj ekzisto kaj aktiveco, por ke la gvidantoj de la Svisa UNESKO-Komisiono pli vigle konsciui pri la esperanto-vivo en Svislando.

## Avantaĝoj per SES

Ĉu SES-membro ĝuas pri avantaĝoj? Tia demando leviĝis dum la lasta ĝenerala kunveno. Lastjare ni plibonigis plurajn servojn. Nun ni peras kelkajn librojn kun rabato de 20%:

*Monumente pri Esperanto* de Hugo Röllinger kaj Thomas Bormann, ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof / Esperanto-objektoj en 54 landoj (stratoj, placoj, monumentoj, ktp.) 111 paĝoj. Prezo: CHF 11.-

*Metodiko de la Esperanto-Instruado* de Rudolf Rakuša (1893-1970). Gvidilo por instruantoj de la internacia lingvo. Tria eldono de verko aperinta en 1957



kaj kompletigita en 1970. 189 paĝoj. Prezo: CHF 9.-

*Nova Esperanta Krestomatio* de William Auld. Kvazaŭ biblioteko en unu libro, kiu prezentas la tutan lingvon, ĝiajn varion kaj fascinon. 509 paĝoj. Prezo: CHF 25.-

*La Danĝera Lingvo* de Ulrich Lins. Studo pri persekutoj kontraŭ esperantistoj. Ĝi legiĝas kiel streĉa romano. 568 paĝoj. Prezo: CHF 39.50

*La Fenomeno Esperanto* de William Auld. Esearo pri diversaj aspektoj de Esperanto. 120 paĝoj. Prezo: CHF 11.-

*Ĉu li venis trakosme?* de Johano Valano. Originala krimromano de nia ŝatata svisa aŭtoro. 144 paĝoj. Prezo: CHF 11.-

La indikitaj prezoj estas jam rabatitaj. SES ne ĉerpas profiton. Limdato por mendoj: 30.11.98 al la peranto Anĝelo Mellini, sekretario, Büntacher 21, 5626 Hermetschwil. ☎ 056 633 33.

## Donacoj

La kasisto Barbara Pochanke dankas pro la sekvaj donacoj:

Agado 2003: Françoise Badoux: CHF 10.-; David Buhlmann: 50.-; Walter Giannini: 100.-; Hélène Raymond: 50.- Willi Rieser: 10.-; Dieter Rooke: 50.-; Henri Wettstein: 50.- Anonime: 25.-

## Reĝustigoj

En la listo de la honoraj membroj, kiun ni ricevis por publikigo en *SES informas* 98-4, estis eraro. Jen do nova listo, kiun ni esperas definitive ekzakta: Arthur Baur, Dante Bertolini, Werner Läderach, Fritz Liechti, Lilly Schaerer kaj Madeleine Stakian.

Jen ankaŭ la listo de la dumvivaj membroj: Perla Ari-Martinelli, Claude Blanc, Sonja Brun, Renata Filali, Dieter Rooke kaj Konrad Rey-Zollinger.

## Redaktaj limdatoj

Por la jaro 1999 bonvolu noti la ĉisekvajn redaktajn limdatojn:

Por *SES informas* 1999-1 (januaro + februaro + marto) la redakta limdato estos la 20an de decembro 1998.

Por *SES informas* 1999-2 (aprilo + majo) la redakta limdato estos la 20an de marto.

Por *SES informas* 1999-3 (junio + julio + aŭgusto) la redakta limdato estos la 20an de majo.

Por *SES informas* 1999-4 (septembro + oktobro) la redakta limdato estos la 20an de aŭgusto.

Por *SES informas* 1999-5 (novembro + decembro) la redakta limdato estos la 20an de oktobro.



Bonvolu ne atendi la lastan redaktan momenton por sendi viajn raportojn kaj anoncojn, ĉar la limdato konkludas laboron jam komencitan plurajn tagojn antaŭe.

## Rememorige

### Merkatika tago en Bern

**21-an de novembro 1998**

10h30-16h30: Hotelo National, Hirschengraben 24 (10 min. de la stacidomo).

Por pli detalaj sciigoj vidu la numeron 4an de *SES informas*.

Centra demando: Kiel surmerkatiigi esperanton? Gvidos d-ro Marco Picasso, fakulo pri komunikado.

Ĉu vi aliĝis??? Ne maltrafu tiun rendevuon. Antaŭa sinanonco dezirata al la prezidanto: Bruno Graf, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen, skribe au telefone ☎ 031 921 44 59.

## SES-Agendo 1999

Rezervu la ĉi-sekvajn datojn:

**13-an de februaro 1999:** Laborkunveno en Bern pri la stato de SES. Kie ni staras? Kien ni iros? Kiel teni nian pozicion? Prelegos

d-ro Tazio Carlevaro. Diskut-rondoj serĉos ideojn kaj perspektivojn. Detalaj informoj aperos januare en *SES informas* 1999-1.

**15-an de majo 1999:** Ĝenerala Kunveno de SES en Zŭrich kun rendevuo de aktivuloj kaj kultura temo. Detalaj informoj aperos aprile en *SES informas* 1999-2.

## C.D.E.L.I

Biblioteko de la Urbo, Progrès 33,  
2305 La Chaux-de-Fonds. ☎032 967  
68 55. Fakso: 032 967 68 29.

Sub la titolo **KOMENTOJ** Dietrich M. Weidmann redaktas internete periodaĵon, kiu estas konsiderebla kiel *La unua ĉiutaga Esperanto-Ĵurnalo* kaj li havigas al CDELI kopion de tiuj paĝoj, kiuj tiel postvivos la alvenon de novaj paĝoj. La kolekto estos do konsultebla en la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds inter la periodaĵoj de CDELI.

La 3-an de oktobro kun tiu sendo li donis interesajn sciigojn: "Ni povas nombri per nia komputilo la vizitantojn de la paĝaro de **KOMENTOJ**. Ni posedas statistikon detalan ekde novembro de la lasta jaro. La nombro de vizitoj varias semajne inter 402 (minimumo) kaj 1368 (maksimumo), averaĝa nombro de vizitantoj semajne estas 800 - tio donas jare 41'600 legantojn! Laŭ individuoj

ne eblas kalkuli, ĉar teknike ne eblas rekonii, kiu vizitas la paĝon, eblas nur diri de kie. Entute nia legantaro venas el 72 landoj. Se ni tamen konsideras, kiel ni scias el reagoj de legantoj, ke nia averaĝa regula leganto vizitas nin unufoje en du semajnoj, ni povas konkludi, ke nia legantaro konsistas el 12'600 individuoj. Cetere la svisa/germana serĉmaŝino Lycos trovis lastsemajne 5600 diversajn hejmpaĝojn pri aŭ en esperanto! Tiu nombro ne estas la nombro de ĉiu esperanto-paĝoj en la reto, ĉar la serĉmaŝinoj povas nur trovi tiujn paĝojn, kiujn oni konigas al ili!

## **Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj Svisa ILEI-Sekcio**

François Randin, Vallombreuse 14,  
1004 Lausanne. Adreso elektrona:  
<francisko@esperanto.nu>

Sekve al kunsido de la Svisa ILEI-Sekcio okazinta en Pully la 12an de septembro, la prezidanto François Randin, helpe de Mireille Grosjean, sendis atentigon al la Svisa Konferenco de la Direktoroj de la Publika Instruado en Berno kaj al la lingvisto profesoro Lüdi en Basel, prezidanto de la fakularo verkanta la novan koncepton por la instruado de la fremdaj lingvoj en Svis-

lando. Ni opinias utile publikigi tiun ĉi tekston en ties franca versio:

*Lausanne, le 28 septembro 1998  
Mesdames, Messieurs,*

*Pour des raisons fort diverses, il souffle un vent nouveau en Suisse dans le domaine de l'enseignement des langues. En effet, on parle de bilinguisme, on lance des programmes d'immersion, on introduit un enseignement précoce des langues, on vise des compétences aussi poussées à l'oral qu'à l'écrit, on tente de sensibiliser les enfants à l'existence d'autres parlars. Les habitudes qui semblaient immuables se voient ébranlées et remises en question en peu de temps. Un climat d'effervescence s'est établi, qui ouvre la porte à des innovations.*

*D'autre part, on met en évidence les apprentissages susceptibles de garantir la cohésion nationale; on prend aussi garde à ne pas jeter le bébé avec l'eau du bain. Ces deux tendances semblent s'opposer; elles nous paraissent pourtant positives et complémentaires.*

*En tant qu'enseignants de langues étrangères pour la plupart d'entre nous, et utilisateurs de l'espéranto, nous sommes particulièrement intéressés par le pluri-*



linguisme et nous avons été très intéressés par le rapport Lüdi, audacieux et stimulant. Nous observons et vivons ce moment de remise en question avec beaucoup d'intérêt.

Nous désirons par ce message porter à votre connaissance un aspect de l'espéranto qui est au moins aussi méconnu que la langue elle-même: la valeur propédeutique de l'espéranto. Diverses expériences pédagogiques ont été réalisées, en Suisse et à l'étranger, qui ont montré que l'acquisition de la langue conventionnelle espéranto en première langue étrangère facilitait l'apprentissage d'autres langues naturelles. Les rapports sur ces expériences sont réunis au Centre de Documentation et d'Etude sur la Langue Internationale (CDELI), qui fait partie intégrante de la Bibliothèque de la Ville de La Chaux-de-Fonds. Les réflexions actuelles sur l'apprentissage des langues montrent que le point crucial est la distanciation que l'apprenant doit opérer face à sa langue maternelle. C'est précisément sur ce point que l'espéranto apporte une solution payante et efficace.

Les documents annexés à cette lettre vous apporteront des infor-

mations plus précises et plus détaillées.

Dans l'espoir que vous voudrez bien accueillir notre initiative dans un esprit d'ouverture et d'objectivité, nous vous prions, Mesdames, Messieurs, de recevoir nos très respectueuses salutations

Pour la section suisse d'ILEI  
le président: François Randin

Aldone troviĝis la ĉisekvaj dokumentoj:

Document sur le projet "Neighbour".

Liste d'experts et bibliographie succincte.

Esperanto in der Schule?

L'espéranto, le meilleur tremplin pour l'étude des langues étrangères de Claude Piron.

Kiel fakuloj estis listigitaj: Claude Piron, Claude Gacond, Jean-Thierry Von Buren, Tazio Carlevaro, Mireille Grosjean kaj Nicole Margot.

Esperable tiu ĉi letero renovigos la kontaktojn kun la instru-  
aŭtoritatoj.

# K.C.E.

**Kultura Centro Esperantista**  
Strato Postlers 27, Poŝtfako 311, 2301  
La Chaux-de-Fonds. ☎ kaj fakso: (032)  
926 74 07.

## Ekzamenoj

**Konrad Rey** el Luzern kaj **Anna Laszay** aŭ **Amika Anjo** el Hungario sukcese alfrontis la unuagradan ekzamenon de SES ĉe KCE en La Chaux-de-Fonds. Ili estas la unuaj ekzamenitoj kadre de la nova regularo, ellaborita de KCE laŭ la peto de SES por oficiala tutsvisa diplomo. Ni rememorigas, ke eblas ekzameniĝi por tri gradoj: la lasta, je nivelo altlerneja, ebligos la aliĝon al la internacia kurso de ELTE-Universitato en Hungario. Kandidatoj al ekzamenoj sin anoncu al **Giorgio Silber**, sekretario de KCE.

## Fin- kaj nov-jara feriado

Ekde la 28a de decembro vespere ĝis la 3a de januaro matene KCE proponas unikan jarfinon: post matenmanĝo, ĝis tagmezo vi lernos kaj kreos lignoarte kun **Tamás Szabó**; posttagmeze vi skios aŭ ekskursos; reveninte en la Centron, post varma teo vi povos trejniĝi pri ŝakoj sub la gvido de **Marco Picasso**. Kaj antaŭ la vespermanĝo vi povos ankoraŭ havi interesan babilrondon pri la

esperanto-literaturo. La vespera programo inkluzivas spagetumadon, marokan kuskuson, svisan fonduon, hungaran gulaŝon. Ĝi kulminos per silvestra bankedo. Respondecos **Judit Felszeghy** kaj **Tamás Szabó**. Anoncu vin frue, sendante CHF 120 por la kursoj. La manĝokostoj estas komunikotaj.

## Movada vivo

Ni povas anonci kaj raportoj nur laŭ la sciigoj, kiujn ni ricevas. Dezirindus, ke post ĉiu esperanto-kunveno responsulo mallonge raportu al la redaktoro de *Svisa Esperanto-Societo informas* pri la okazintaĵoj kaj samtempe anoncu al ni la datojn kaj programon de la venontaj aranĝoj.

## Basel

### Esperanto Societo Basel

PF 103, 4005 BASEL. ☎0049 76 214  
57 12. Kunvenoj: 20.00 en Altersheim,  
Neubad.

**Kunvenoj: Novembro 26an:**  
Planado por 1999 kaj "Ni ludas skrablon".

**Decembro 12an:** Zamenhofa  
Festo en Francio.



# Genève

## Esperanto-Grupo "La Stelo"

PF 188, 1211 GENÈVE 20. ☎022 740 04 45.

**Kunvenoj: Novembro 24an:** 19h00 en elektota restoracio (telefonu!): Vespero honore al Madeleine Stakian.

**Decembro 3an:** 18h30. rue Cornavin 11, 2a etaĝo: neformala renkontiĝo.

# Lausanne

## Laŭzana Esperanto-Societo

PF 389, 1009 PULLY. ☎021 729 58 02. E-mail: lausanne . ch @ esperanto . nu. Homepage: <http://www.esperanto.ch>. **Kunvenoj:** 20h30 en la Stacidomo, 1-a etaĝo. **Diskuta rondo:** ĉiumonate je la tria lundo en hotelo Continental inter la 18h00 kaj la 20h00.

**Kunvenoj: Decembro 13an:** Zamenhofa Festo. **Januaro 1999** (dato fiksota): Nicole Margot prelegos pri la romandaj dialektoj

# Luzern

## Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke. ☎ 041 280 46 12.

**Kunvenoj:** ĉiun duan jaŭdon de la monato: 19h30: paroliga leciono; 20h00: babilado; 20h20: interŝanĝo de informoj; ĉirkaŭ 20h45: komenciĝas la anoncita parolado. Kunvenejo: Hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke, atingebla per trolebuso 2

de Lucerno kaj de la regiona trajno ĝis haltejo-stacidomo Emmenbrücke (ĉ. 100 m).

## Agotago je la 3a de oktobro

Unuafoje en Lucerno ni realigis **Agotagon** laŭ tiu ĉi formo:

Dum preskaŭ 7 horoj ni prezentis esperanton en tendoforma budo sur homo-riĉa placo meze de Lucerno.

Ĉirkaŭ la tendo pendis folioj kun informo "*Esperanto, die transnationale und internationale Sprache*" Sur longa tablo prospektoj, libroj, broŝuroj kaj gazetoj abundis je la dispono de la publiko. Dank'al elektro de najbara kiosko ni povis montri la video-kurson "*MAZI en Gondolando*", kiu allogis plejparte tre junajn spektantojn.

Dum la tuta tempo deĵoris - ĉiam minimume triope - entute sep membroj de la Lucerna Esperanto-Societo (LES), kiuj provis interesi la preterpasantojn, donis informojn kaj kuraĝigis al partopreno en konkurso, kiu postulis respondi al tri simplaj demandoj laŭ la multobla elekto-metodo. La unua premio estis bonhav-kupono por semajnfina enkonduka esperanto-kurso; la dua kaj la tria po unu lingvogvidilo "*Esperanto für Globetrotter*". Ni disdonadis la koloran germanan faldfolion kun surgluitaj adres-etikedoj de SES kaj LES kune kun aligilo por la

jam menciita enkonduka kurso antaŭvidita por la 17/18aj de oktobro 1998.

Nian standon vizitis ankaŭ turistoj, plejparte alilingvanoj, kiuj feliĉe (bedaŭrinde mankis diverslingvaj broŝuroj) povis esti informataj en siaj naciaj lingvoj, kaj plurfoje la jarlibro de UEA utilis por doni kontaktadresojn en la koncernaj landoj.

Je la sama tago LES organizis surstratan enketon laŭ la rekomendoj kaj gvidlinioj de la SES-estraro. Dum daŭra pluveto tri sinjorinoj plenumis tiun ĉi taskon. Rimarkindas, ke inter la junaj gestratuloj esperanto estis apenaŭ konata.

Paul Scherer

## Neŭŝatela Kantono

### Studo de esperanto en La Chaux-de-Fonds

En la salono de C.D.E.L.I., Biblioteko, pordo nord-orienta. ☎032 967 68 55.

Venontaj studvesperoj kun Claude Gacond: 11an kaj 25an de novembro kaj 9an de decembro de la 19h45 ĝis la 21h45. Laŭtleĝo de la movade historia teatraĵo *Patreco* de M. Wolf, babilado, gramatikaj ekzercoj, malkovro de legindaj libroj. Novaj partoprenantoj estas ĉiam bonvenaj.

## Edziniĝo

La 26an de septembro la juristino Sonia Koleva edziniĝis al la kamparano Rémy Bétrix. Kun sia filino Sylvie ŝi do forlasis la urbon La Chaux-de-Fonds por loĝi funde de la valo La Sagne sur la monto Crêt-Pellaton. Al ilia geedziĝo estis invititaj Andy Künzli, David Bühlmann, Andrée kaj Claude Gacond. Dum la festo tiu lasta alportis la salutojn de la esperantistoj per la lego de la sekva poemo de Raymond Schwartz, kies temo *Intima agrikulturo* ne nur rilatas al la nova profesio de Sonia, sed ankaŭ eĥas al la nutraj problemoj, kiujn ŝi travivis en sia devena lando Bulgario:

*Dum epoko de l' mizero,  
De l' bezono kaj malsat',  
Kiam mankas kaj butero  
Kaj terpomoj kaj salat',  
Kiam ĉiuj homoj plendas  
Ne trovante plu spinacon,  
Oni al ni rekomendas  
Utiligi ĉiun spacon.*

*Tute prave, tute ĝuste!  
Semu, semu sen hezit',  
Vi rikoltos dumaŭguste  
Legomaĵojn kun profit'!*

*For la florojn! Ili estas  
Nunatempu pura blago.  
Eĉ se ilin vi digestas,  
Ne profitas al stomako.*



*Laŭ vidpunkto de menuo  
Pli valoras de nun iri  
Al galanta rendezuo  
Kun bukedoj por... kuir!*

*Jam ne estas plu sekreto,  
Kion diras la proverbo,  
Ke "sur ĉiu terpeceto  
Kreski povas nutra herbo".*

*Se vi loĝas sen ĝardeno,  
Lastetaĝe en la urbo,  
Sciu, ke en lavbaseno  
Bone kreskas la kukurbo,  
Ke sufiĉas por citrono  
Havi keston sur balkono,  
Ke prosperas la karotoj  
En malnovaj florpotoj,  
Fazeoloj*

*En skatoloj  
Kaj la pizoj  
En valizoj  
Aŭ - laŭ pli konata moto -  
En... pizpoto.*

*Fungoj kreskas sur la planko  
(Plej volonte sub la ŝranko)  
Kaj sub via propra lito  
Tre manĝebla parazito;  
Gravas nur - por ĉion diri -  
Ke vi sciu ĝin kuir...*

*Sed ekzistas ankaŭ homoj  
Sen loĝejoj kaj sen domoj.  
Laŭ ekzemplo de amiko,  
Jen por ili la taktiko:  
Li en ĉiujn poŝojn metis  
Iom da fekunda tero,  
Kien li grenerojn ĵetis  
Dum printempvetero,  
Kaj de nun en ĉiu poŝo,*

*Pli sukcese ol sub kloŝo,  
Kreskas kvazaŭ en Eden'  
Ĉiu frukto de ĝarden'!*

*Ĝena estas nur melono,  
Dekstre, en la pantalonono.  
Se krekadi ĝi persistos,  
Ĉu la pantalon' rezistos?*

*Krome, en la kavajn dentojn  
Li sukcesis semi lentojn,  
Kaj sur supron de l' kranio  
Kampon de makaronio,  
Sub akselon  
Petroselon  
Kaj bulbojn, po du,  
En ĉiu naztru'  
Kaj...  
Kaj tiel plu!*

*Li hieraŭ al mi sendis  
Tri foliojn da salato,  
Sed mi ilin tuj revendis  
Eĉ sub prezoj de l' merkato,  
Mi konfesas kun respekto,  
Ke obsedis min suspekto  
Pri ilia origino  
Estas ĉio. Punkto. Fino!*

## **Funebro**

La 20a de oktobro estis ege trista tago. En la katolika preĝejo de Le Locle ni adiaŭis al Edgar Jobin-Nowak, kiu subite mortis en sia 49a jaraĝo la 12an de oktobro dum feria restado en Hispanio. Al liaj edzino Mariola kaj gefiloj Silvio kaj Varinka ni esprimas nian profundan kunsuferon. La

instruisto Edgar Jobin konatiĝis kun Mariola Nowak okaze de esperanto-kongreso en Hungario kaj ilia geedza lingvo restis la internacia, dum li rilatis franc-lingve kaj ŝi pole kun la gefiloj.

## Wil

### Esperanto-Klubo Wil

S. POCHANKE, Letenstr. 70, 9500 Wil. ☎071 911 68 30. **Kunvenoj:** 20.00 en la Restoracio Schweizerhof, Unt. Bahnhofstr. 18.

**Kunvenoj:** Novembro 4an: 50a IFEF-Kongreso en Danlando, raportos Gertrud Eggenberger.

**Decembro 2an:** Nikolaa Vespero.

## Zürich

### Esperanto-Societo Zürich

PF 858, 8034 ZÜRICH. ☎01 251 50 25

**Kunvenoj:** 19.15, Elsengasse 22, 8034 Zürich

**Kunvenoj:** Novembro 9an: Prelego de Majra, instruistino el Kubo, pri la esperanto-movado kaj la aktuala situacio en Kubo.

**Decembro 9an:** Kuba vespermanĝo kun absolvintoj de la 2a kuba danckurso. Aliĝo plej malfrue la antaŭan tagon. Kostoj por la manĝo: CHF25.-

**14an:** Zamenhofa Festo: riĉa kultura programo por la spirita malsato, fonduo por la ventro.

Bonvolu aliĝi plej malfrue matene por ebligi la akiron de la fromaĝo kaj pano.

**1999 Januaro 13an:** Komenco de nova kuba danckurso.

### Esperanta familia rondo

Ni kunvenas ĉiumonate la unuan sabaton je la 14h30 ĉe familio

# Raportoj

## Regiona kultura semajnfino en Cully

Ree okazis altnivela regiona semajnfino de SES en Cully la 12/13-ajn de septembro. Tiun aranĝon prizorgis la laŭzianoj, kiuj, kiel ĉiam, celas alten, kaj tion ili reale sukcesas.

La programo estis precipe kultura, sed ĝi entenis ankaŭ distrajn erojn. La ĉarma kaj historia urbeto Cully kuŝas apud Laŭzano en idilia loko. Dorse, al-kroĉita al ondumanta altaĵo la naturo riĉas, ĉefe abundas vitejoj meze de kiuj belaj vilaoj kaj aretoj da domoj ie-tie afable elstaras. Fiere vidalvidas trans la lago la Alpoj.

Ĉio ĉi tamen ne deprenis la atenton dum la ses "lecionoj" de la C-grupanoj. Jes ja la partoprenantoj dividiĝis en tri grupojn:



A: lingvokurso por komencantoj,  
B: por progresantoj.

Ĉijare la programon de la grupo C plenumis Claude Gacond. Superfluas prezenti lin. Kiam li prelegas, la sukceso estas garantiata. Apud lia personeco ĉiu fartas bone. Kiom preparita li estas pri la koncerna fako (pri liaj konoj neniu dubas), tion elokvente demonstris, kiel li pritraktis ĝin.

Temo: "Al la malkovro de la revuo *Literatura Mondo*".

Disvolviĝo de la aranĝo: tablo sur kiu staris impone tuta kolekto de la revuo *Literatura Mondo*, malantaŭ tiuj 6 libregoj apartenantaj al la Laŭzana Esperanto-Societo staris la "oratoro", kiu nin provizis per 34paĝa materialo, kiun li preparis por la "lernantoj" (enorma laboro). Kaj helpe de tiu ĉi dokumento ni ĝuis la po-50-minutajn "lecionojn".

La intermetitaj paŭzoj forflugis je kafotrinko, vizito de la librotablo, kie oficis David Buhlmann, babilado kun denove renkontitaj amikoj, rapida paŝo al la lago, ktp.

La temo estis alloga! Aliĝila anonco: "La okjara efemera vivo inter-milita de la budapeŝta entrepreno *Literatura Mondo* decidige evoluiĝis esperanton de internacilingva projekto al matura esprimo beletra." Ĉi tiu anonco trafe pruviĝis en la diversaj ĉapitroj preparitaj de Claude: - naskiĝo kaj celoj - la fondintoj - la neologisma

problemo - situacio ankoraŭ aktuala.

Fondis la revuon *LM* en 1922 kvinopo, kiu entenis interalie la nomojn de Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay. Dum la sinsekvaj ĉapitroj revenas tiuj du figuroj, kiuj tiom rolis en la esperantaj literaturo, historio kaj movado. Iliaj malsimilaj karakteroj, aliaj malsimilaj vid- kaj starpunktoj pri lingvaĵo, verkado, stilo... bone montriĝis en la revuo: Baghy atakas, Kalocsay respondas, redakcia reago, la argumentado de Kalocsay: al vortriĉeco per poezio... Aliaj elstaraj nomoj kaj la pseŭdonomoj de Baghy kaj Kalocsay surpaŝiĝas en tiu valora revuo: Paŭlo. Balkanyi, Ferenc. Szilagyi, Jean. Forge, Teodoro kaj Raymond Schwartz, Paŭlo Lengyel, Hans Weinhengst...

Tiel ni iris de verkisto al verkisto, de epoko al epoko, de evento al evento. Tute aparte mi aprezis la intervjuon kun Kabe, kiu venis al ni danke al *LM*. Kaj ankaŭ alia teksto de Jean Forge renkontigis nin en pariza kafejo kun la malfacile intervjuebla Raymond Schwartz. Ĉiuj legaĵoj estis adaptitaj por legiĝi per du aŭ tri voĉoj, kvazaŭ ili estus skeĉoj.

Areto da partoprenantoj havis ĝuste la taskon sinsekve legi parton el la tekstoj. Tio ne nur vigle nuancigis la kunestadon, sed

ankaŭ donis al la legantoj la impreson travivi tiun epokon kun ties okazaĵoj.

La materialo, kiun ni ricevis, titoliĝas *Unua trafoliumado de la revuo*. Tio esperigas nin pri alia nova "trafoliumado". Ĉu Claude ree proponos al ni plian delicon? Mi multe ĝuis la unuan, multon lernis. Tial mi esperas je dua!

Anita Altherr

## Nostalgia 17a Internacia Literatura Forumo en Pollando

Tre interesa kaj laŭdinde organizita seminario pri *judaj kulturo kaj kontribuo al la esperanta* okazis inter la 23a kaj 28a de aŭgusto 1998 en Svidniko (apud Lublino, sudorienta Pollando). Ĝin organizis Kooperativo de *Literatura Foiro*, Teatro NN Lublino, Kafejo Szeroka 28 Lublino, kaj Esperanto-Grupo Konkordo, Svidniko.

La surloka ĉefaranĝinto Tomasz Chmielik, konata instruisto en Svidniko kaj elstara pola esperantisto, elektis seminarian kadran temon nekutiman en esperantujo: judaj historio, kulturo kaj literaturo en la lublina regiono kaj ĝiaj rilatoj al esperanto.

Krom la esploro de "judaj elementoj" en la esperanto-kulturo, la seminario imprese

ilustris la iaman ekzistadon de riĉa juda kulturo en tiu sudorientpola limregiono, kiu aĝis kelkajn jarcentojn kaj kiu trovis sian tragikan finon per la freneza neniiga politiko de la nazioj dum la dua mondmilito. La unua programero do estis la vizito al la iama koncentrejo Majdanek apud Lublino, kie estis dum jaroj turmentitaj verŝajne duonmiliono da homoj, grandparte poloj kaj judoj, multegaj el ili pafmortigitaj kaj gasigitaj. Aliaj signifaj ekstermaj koncentrejoj en la lublina regiono nomiĝis Sobibor kaj Belzec. Majdanek postlasas al la vizitanto apartajn emociojn, ĉar tie oni povas viziti la fifamajn gasĉambrojn kaj la kremaciejon, ambaŭ en originala stato. La koncentrejo troviĝas tuj apud la ĉefa strato inter Lublino kaj Svidniko, tiel ke oni renkontas ĝin ĉiufoje, veturante inter ambaŭ urboj.

Malmulto pri la orientjuda historio estas konata al la esperantistoj. Tial la seminario havis ankaŭ klerigan celon. Kiel klera docento kaj kompetenta pedagogo de sia urbo, Tomasz Chmielik faris al ni plurajn prelegojn ĉefe pri judaj verkistoj (precipe Isaac Bashevis Singer, Shalom Alejchem, Jichak Leib Perez, Mendele Mojcher Sforim) kaj prezentis kelkajn tradukaĵojn el sia plumo.



Grava riĉigo de la programo estis la ĉeesto de du polaj fakuloj pri juda historio: Grzegorz Linkowski montris premiere sian plej novan filmon *La ĥasida balado* - dokumento pri plurtaga internacia juda festado en Ukrainio. Dum la seminario ni ĝuis la tre valoran fakan akompanion de Robert Kuwalek, doktoriĝanto pri la historio de la lublinaj judoj. Li ne nur impresis nin per siaj konoj prelegante pri sia temo, sed ankaŭ gvidante nin dum la ekskursoj: tuta tago estis dediĉita al la regiono de Zamosc, mirinda urbeto proksime de la ukrainia limo, konstruita en la 17a jarcento en renesanca stilo. Survoje al Zamosc ni haltis en Izbica, urbeto siatempo speciale konstruita por la judoj, antaŭ ol viziti la sinagogon en Zamosc, kiu cetere troviĝas tuj apud la tiea Zamenhof-strato. La ekskurso plukondukis nin al la urbeto Szczepleszyn, kie staras malnova sinagogo kaj kie troviĝas tre interesa historia juda tombejo. Alitage ni veturis al Kazimierz Dolny, bela historia urbeto okcidente de Lublino, kie ni vizitis aliajn judajn tombejon kaj ekssinagonon. Vizitante la judan tombejon de Lublino, ni eĉ havis la okazon renkonti unu el la lastaj judoj de la urbo.

Inter la ekskursaj tagoj ni ĝuis plurajn prelegojn kaj kulturajn programerojn, krom la menciitaj,

ankaŭ tiujn de Zofia Banet-Fornalowa pri zamenhofidoj kaj Janusz Korczak, la fama orfo-pri-zorganto heroe mortinta. Mi mem preparis prelegeton pri la german-juda historiistino kaj verkistino Verena Dohrn, kiu antaŭ kelkaj jaroj vojaĝis al Galicio, Volhinio kaj Podolio kaj esploris la judajn lokojn, kiujn ni parte vizitis dum la seminario.

Mi ne volas forgesi menciiti specialan eventon okazintan en la muzeo de la pola verkisto Jozef Czechowicz en Lublino: Afable akceptis nin ĝia direktorino, kiu recitigis far Tomasz Chmielik el tradukoj de verkajoj de Czechowicz, akompane de la pollingva originalo, laŭtlege realigita de ĉarma juna pola fakulino pri la poeto.

Apartan noton havigis al la programo la teatraj spektakloj de Jerzy Fornal, *Sopiro-Laboro-Espero*, bazita sur la verkaro de Zamenhof, kaj *El la verda Biblio* laŭ la verko de Lejzeroviĉ, kaj la amuzaj prezentoj de Bulgara Esperanto-Teatro, kiu speciale venis al Lublino por tiu seminario. Anna Buczynska kantis hasidajn nigunojn okaze de la solena fermo de la 17a IJF.

Antaŭvidita estis renkontiĝo kun la hungara verkisto Istvan Nemere. Tiu ĉi, ja alveninte al Lublino, denove forlasis la urbo sen averti la organizanton de la

seminario kaj sen kontakti la partoprenantojn. Feliĉe, kelkaj bongustaj tag- kaj vespermanĝoj en diversaj polstilaj restoracioj de Lublino kaj Svidniko kaj multaj humurplenaj epizodoj apud la seriozaj momentoj reglatigis tiun mankon.

Do entute tre riĉa, substanca, iom streĉa, sed trafa programo, kiun cetere partoprenis hontinde malmultaj esperantistoj, plimalpli ligitaj kun LF-koop: 4 el Svislando (Giorgio Silfer, Perla Martinelli, David Buhlmann kaj mi mem), 1 el Francio, 1 el Hungario, 2-3 poloj kaj 8 bulgaroj, inter ili dramaturgo kaj LF-redaktoro Ljubomir Trifonĉovski el Vraca kaj 7 geaktoroj de la Bulgara Esperanto-Teatro el Sofio. Bedaŭrinde la seminariaj tagoj pasis multe tro rapide. Feliĉe, mi mem restadis kelkajn kromtagojn en Pollando antaŭ mia reflugo al Svislando, tiel ke mi povis surloke digesti la impresojn, nostalgii pri la pasinta historio, flarante la specifan etoson de Lublino kaj ĉirkaŭaĵo - inter glora pasinteco kaj senvizaĝa post-komunismo.

Organizinto kaj amiko Tomasz Chmielik meritas plenan laŭdon, agnoskon kaj dankon pro tiu sindone planita kaj neforgesebla seminario, kaj mi mem kiel slavisto kaj historiisto lernis multon

novan pri la orientjuda kulturo, kio instigis min pluokupiĝi pri ĝi.

Andreas Künzli

## Salutvortoj al la berna kaj biela juda komunumo

Kiel oficiala reprezentanto de UEA ĉe UN en Genève, Andreas Künzli sendis la 14an de oktobro saluton okaze de la 150jara jubileo de la berna kaj biela juda komunumo. Jen citaĵo el tiu ĉi letero:

*Sehr geehrte Damen und Herren,  
Aus Anlass des 150-Jährigen Bestehens der Jüdischen Gemeinde Bern gratuliert Ihnen der Vertreter des Esperanto-Weltbundes bei den Vereinten Nationen in Genf.*

*Wir möchten in Erinnerung rufen, dass die internationale Sprache Esperanto im Jahre 1887 von dem ostjüdischen Augenarzt und Philantropen Ludwig Lazarus (Lejzer Markovic) Zamenhof geschaffen wurde. Seither fand diese Bewegung, die für eine neutrale Weltbrückensprache, für die Sprachen- und Menschenrechte und für eine humanistische Ethik eintritt, weltweite Verbreitung und Beachtung. 1954 wurde Esperanto als kulturelles und völkerverbindendes Phänomen in einer Resolution der UNESCO*



gewürdigt. Diese Tatsache wurde 1985 von dieser Organisation bekräftigt.

Gerne würden wir dem Festakt zum 150. Jubiläum der Jüdischen Gemeinde Bern und Biel am 18.10.1998 beiwohnen.

Hochachtungsvoll

A. Künzli

## 84a Universala

### Kongreso de Esperanto

Berlino, 31 julio - 7 aŭgusto 1999

- Partoprenu la kongreson sub la temo "Tutmondiĝo - ŝancoj por paco?"

- Konatiĝu kun la fama urbo Berlino kaj ties multaj vidindaĵoj.

- Unu el la plej taŭgaj kongresejoj atendas vin: la Internacia Kongresa Centro, facile atingebla publik-transporte en la Berlina Foirejo (okcidenta urboparto).

- UEA rezervis plurajn hotelojn kun bonega trafika situo.

- Kongreskotizo ĝis la 31a de decembro 1998:

por individua membro de UEA: CHF 221.-

por ne individua membro de UEA: CHF 278.-

- Petu informon kaj aliĝilon al la peranto: Sonja Brun, Waldeggstrasse 28, 6343 Rotkreuz. ☎ 041 790 46 40.

# Libro

**Vocabolario Esperanto-Italiano, Italiano-Esperanto.** Nino VESSELLA kaj Renato CORSETTI. Milano, Cooperativa Editoriale Esperanto, 1998. 108p. ISBN 88-85872-10-7.

Vortaroj estas necesaj al ĉiuj, de la lingvo-novuloj al lingvaj specialistoj. Kompreneble temas pri vortaroj divers-celaj, kaj tial divers-formaj kaj -enhavaj. La merkato de esperantujo longe proponis preskaŭ sole vortarojn esperanto-nacilingvajn kaj nacilingvo-esperantajn por komencantoj. Sed mankis moderna manvortareto por komencantoj. Nun ni havas ĝin.

Nino Vessella kaj Renato Corsetti estas konataj en la italaj sciencaj medioj, kiuj okupiĝas pri lingvistiko. Ili konas multe pli ol la abocon de vortar-konstruo. Kaj ili scias, ke la enhavo de vortaro dependas de la publiko, kiun oni celas. Ili celas principe komencantojn, kaj homojn, kiuj troviĝas en ĉiutaga situacio, ĉar ili uzas esperanton praktike, do parole, kaj ne nur skribe. Ili opinias, ke tia verketo devas havi du partojn (itala-esperanta, kaj esperanto-

itala), por atingi sian celon. La esperanta vortotrezoro venas de la listo de plej necesaj vortoj.

La vortaro estas facile utiligebla, ĉar ĝi proponas evidente kaj sisteme ankaŭ multajn kunmetaĵojn, kiujn oni enmetas ĉe la komenca vorto.

Ankaŭ la preso estas klara, bone legebla. Mi bedaŭras nur jenon: ke temas ja pri libreto in-8-o, sed ne pri poŝlibro.

Dr Tazio Carlevaro

## Ni legu

En 1907 la 19jaraĝa Edmond Privat travivis tristan kristnaskon en Nov-Jorko. Tion li rakontas en *Aventuroj de Pioniro: "Tre malgajan Kristnaskon mi pasigis en mia malpura teretaĝa ĉambro. La luistino eĉ vendis miajn pantoflojn al najbaro por aĉeti karbon por iom varmigi dum la kristnaska tago. Malĝojon, malvarmon kaj veran nigran vesperon de mal-kuraĝigo mi pasigis la antaŭkristnaskan nokton, sed matene alvenis mirakle du varmigaj leteroj: invito al svisa familio en Brooklyn kaj invito de la esperantistoj en Filadelfio por fari kursojn tie dum du monatoj kun certigita loĝado kaj nutrado."*

Tiu kristnasko inspiris al Edmond Privat novelon, kiun Juan Régulo Pérez reeldonis en 1960 en

la libro *Junaĝa Verkaro* de Edmond Privat. Prepare al kristnasko 1998a, jen ni donas al vi tiun ĉi emociigan rakonton, kiun la didaktika verko *Trezoro: La esperanta novelarto 1887-1986* de Reto Rossetti kaj Henri Vatré ignoris, same kiel ĉiujn aliajn novelojn de Privat, kvazaŭ li ne estus verkinta prozaĵojn!

## Rozoj por la sinjorino Edmond Privat

Antaŭkristnaska vespero. La urbego zumas. Mil lumoj brilas en noktaj stratoj kaj miloble mil en ĉielo supre. Rulas aŭtomobiloj en senfina procesio, jen haltantaj kvazaŭ longa serpento restreĉita, jen ekveturantaj unu post alia por rehalti ĉe la proksima stratangulo. Ĉiu flugas al sia plezuro kaj sorto.

Sur la trotuaroj amaso densa piediras malrapide, rigardante la helajn butikojn. Sur grandaj arkoj de ruĝaj lampoj sonoradas elektra voko de l' kinematografoj. Frostas. La restoracioj afiŝas gigantajn menuojn je prezoj eĉ pli gigantaj. Ĉe l' pordo de la "Santiago Bar" du knaboj-kuristoj en ruĝa vesto simie salutas alvenantajn aŭtomobilistojn, helpas sinjorinojn en peltoj, gvidas al enirejo.

Deputito Max van Dal ĵus envenis kun du belaj konatinoj. Frat-



inoj certe, bluokulaj kun apero greka. La restoracio estas plena, gaja, brua. Muziko sonas. Glasoj, falsarĝento kaj oranĝoj sunaj hele radias sur blankaj tablotukoj.

Kuras kelneroj, proponas tablon, eltiras seĝojn, prezentas manĝokarton. La sinjoro jam rezervis telefone. Ĝuste. La sinjorinoj trovos spegulon en la vestejo...

Ilin atendante, la parlamentano ĉirkaŭrigardas. Estas iom malfrue. Multaj paroj manĝas jam deserton. Dancistino en ora ŝalo kun nudaj kruroj ĉirkaŭflugas la tablojn kiel dungita papilio.

Trans la vitroj, ekstere, homaj vizaĝoj enrigardas. Fiksaj okuloj, nazoj premitaj, infanaj buŝoj malfermitaj kun fuma spiro tra la frosto. "Fermu la kurtenojn!", ordonas ĉefkelnero diskrete.

Dum alkuras la servoknaboj en ruĝa vesto, ĵus eniris blankhara figuro, maljuna virino en mizera nigraĵo kun korbo plena je rozoj. Tremanta mano proponas florojn: "Rozojn por la sinjorino?" Dika viro kun severaj brovoj turnas la dorson rifuze. "Ĉu vi ne vidas, ke nur kun edzino mi sidas?" respondas la enuplena rigardo La sinjorino efektive silentas.

De tablo al tablo paŝas la roz'avineto. Iuj aĉetas, iuj fordankas. La virino ne insistas. Modesta. Ŝi marŝas pene. Io nobla lumigas la vizaĝon lacan kun nazo fiera, okuloj rezignemaj.

Kia metio je tiu aĝo!, pensas van Dal, kuradi nokte tiel, de strato al strato, de pordo al pordo, por ne frosti tute, ne malsati plene! Io en la brovoj, io en la malĝoja rideto lin memorigas pri patrino lia, tiom amata. Subite li ŝin imagas anstataŭ la virino, devigatan vendadi florojn en vesperaj kafejoj.

Kia ŝiro en la koro! Indigno. Honto. Nia civilizo ne respektas aĝon. Estas krime. Ĉiuj maljunuloj devus ricevi ŝtatan pension senescepte, sendiskute, rajton je ripozo, ĝuo de lastaj jaroj en paco kaj senzorgeco!

Li aĉetas la tutan kvanton de restantaj rozoj en la korbo: "Bonan panjon havis la sinjoro", flustris la virino dankante. Jes bonegan. Ŝin li adoris kaj ne tolerus suferigi; sed pri alies patrinoj, kiu zorgas? Jen la tragedio.

Parlamento fermiĝis hodiaŭ. Ĝi rifuzis projektitan leĝon por asekuri maljunulojn. Ankaŭ li voĉdonis kontraŭ. Tro pezas impostoj. Minacitaj kapitaloj riskas elmigri. Grava danĝero. Prefere kuraĝigi propran ŝparon. Interesi popolon je ŝparkasoj. Reklami asekurajn kompaniojn. Kio ne? Sed jen, se anstataŭ fremda virino starus propra patrino kun rozkorbo nokte en kafejo, la tuta afero ŝanĝiĝus.

Egaleco, frateco, belaj vortoj, kompreneblaj nur se oni vidus propran sangon en ĉiuj homoj.

Ankaŭ li kontraŭ okhora laborleĝo voĉdonis pro libereco. Nobla principo. Kial niaj avoj ja batalis, se ne pro libereco?

Jes, sed se propra filo aŭ filino ŝvitus tutajn tagojn en fabrikoj, ĉu ne severe oni devigus tiujn akciajn societojn limigi la horojn, ke la homoj povu spiri, iom vidi sunon antaŭ kuŝiĝo, iom sidi hejme kun amatoj?

Frateco! Antaŭ du mil jaroj ĝin predikis hebrea ĉarpentisto. Nu, vidu kiel oni festas lian naskiĝtagon en konvertitaj landoj! Ĉampano, luksaj manĝoj, plenegaj restoracioj je fantaziaj prezoj! Kaj avinoj devas kuri tra la malvarmo kun frostitaj rozoj, eĉ pli frostitaj manoj, kaj la kelneroj devas fermi la kurtenojn por ke malsataj vizaĝoj ne ĝenu la plezuron. Pli similas feston de Kaino, kiu demandis: "Ĉu mi estas la gardanto de mia frato?"

Jam ekludas la orkesto furiozan ĵazon. Negroj batas manojn, frapas tamburojn. Rondflugas la dancistino tute proksime kaj eĉ rabis rozon el la tablo kun rideta permespeto. Revenas la du fratinoj, plenaj je apetito kaj pudro sur vangoj. For la revoj kaj turmenta filozofio. Beletaj nazoj dronas en la rozojn por enspiri bonorodon.

"Ĉu vi fariĝis rusa princo por aĉeti tian tutan ĝardenon?", demandas ĉarmaj lipoj.

"Ne, ĉar se mi estus rusa princo, mi nun estus senmona, kaj se mi havus rusan animon, kian oni prilegas en Tolstoj aŭ Dostojevski, mi tuj ŝanĝus funde mian vivon kaj fariĝus ia Sankta Francisko el Asizi pro la subita semo de tiuj rozoj strange ĵetitaj kiel baraktanta lumeto en mian surprizitan animon. Feliĉe en nia sprita lando, ideoj estas unu afero kaj societa vivo tute alia. Tiaj flamoj ne brulas kaj nia civilizo daŭras."

"Kiel mistere kaj poete! Ĉu vi ne rakontos al ni vian revon pro la rozoj, ĉar ni ja vin atendigis momentegon, ĉu ne? La vestejo estis plena! Pardonu".

"Antaŭ ĉio", ekkriis la dua belulino, "ni ekmanĝu pro Dio! Mi malsategas. Poste, Max, se vi estas karulo, vi nin kondukos al meznokta meso ĉe Sankta Petro. Fama Sarah kantos tie kaj mi tiom ŝatus iri. Ĉu vi ne povus telefoni por lui sidlokojn?"

Kiam la triopo, satigita, atendis sur la trotuaro la menditan aŭtomobilon je la dekunua kaj duono, bruema knabeto kun drona ĉapego vendadis ĵurnalojn kaj kriadis senhalte por varmigi sin:

"Lasta eldono. Diskutoj en la senato! Niaj parlamentanoj voĉdonas al si plialtigon de salajro! Lasta eldono! Senatanoj plialtigas sian pagon! Lasta eldono!"



"Diablo, silentu momenteton", plendis Max al la knabeto, "ci ja boras niajn orelojn".

"Pardonu, Sinjoro", diris la knabeto tuŝante per fingro la ĉapon, tro larĝan por li, "mi ne sciis, ke la Sinjoro Moŝto estas senatano!"

## Kvinpetalo

F-86410 Bouresse (Francio)

### Esplore tra tipaj momentoj de la esperanto-aventuro

laŭ orientiĝo didaktika,  
interlingva, vortara, gramatika,  
beletra kaj historia

### kun Claude Gacond

por la esperanto-studemuloj kaj  
esperanto-instruantoj

La du periodoj 13/17aj kaj  
20/24aj de aprilo 1999 estos  
komplementaj. Ĉeesto en ambaŭ  
estos plej profitiga, sed partopreno  
en parto el ili estos ankaŭ kulture  
riĉiga.

## Gratulo al Claude Piron

Ni fieras anonci, ke okaze de la 83a UK en Montpellier Claude Piron estis elektita honora membro de UEA. Laŭ la oktobra numero 1107 de la UEA-revuo *Esperanto* jen lia resuma biografieto: Claude Piron naskiĝis en 1931 kaj esperantiĝis en 1942. Li estas belgo kaj sviso. Profesie li plenumis funkciojn de tradukisto-protokolisto ĉe UN kaj ĉe Monda Organizo pri Sano, poste de psikologo kaj psikoterapisto. Pri esperanto ni menciuj, ke li kunfondis la Esperanto-Klubon ĉe UN (1958), redaktis la organon *Svisa Espero* en la 60aj jaroj, multfoje instruis pri psikologiaj kaj lingvaj temoj. Jam en 1955 li gajnis poezian premion en Belartaj Konkursoj kaj publikigis ekde 1976, sub la plumnomo Johán Valano, dekon da verkoj: la detektiv-romanon serion *Ĉu...?*, novelaron, poemaron, kantokasedon. Propranome li verkis kurson pri psikologio, facillingvajn romanetojn, 3 kajerojn de *Esperanto-Dokumentoj* de UEA, unu la plej legataj esperanto-libroj de la lastaj jardekoj *La Bona Lingvo* (1989, 1997) kaj la franclingvan *Le défi des langues* (1994). En 1993 li gajnis la Premion Deguĉi.



SES: ( )

CDELI Bibliothèque de la Ville

Progrès 33

CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando

**P.P.**

CH-2305

La Chaux-de-Fonds 5

El Bialystok: lulilo de esperanto, saluton! Mi interŝanĝas esperantaĵojn: gazetojn, fotojn, poŝtkartojn, kalendaretojn, ktp. Antaŭdankon al la interŝanĝemuloj!

Zenon KALINOWSKI

ul. Piaskowa 32

18-402 LOMZA 4

PL PN-WS-MAZOWSZE, (Pollando)

tiuj direktu sian mendon al Fritz Fink, Paix 26, 1400 Yverdon.

## **Granda Vortaro Esperanta-Germana**

Aŭtoro: Prof. d-ro Erich-Dieter Krause, Leipzig.

La germanlingvaj esperantistoj longe atendis tiun monumenton! Lingvistika eldonejo en Hamburgo eldonos tiun kompleksan verkon.

La bindita verko aperos en printempo 1999 kaj ampleksos ĉirkaŭ 900 paĝojn. La Literatura Servo "Espero", c/o Rolf Beau, Saxoniastrasse 35, DE-04451 Althen (Germanio) ĝojas povi jam nun oferti al vi, je subskripcia prezo de DM 68.- tiun ĉi vortaron. Interesatoj sendu mendon al la menciita adreso.

## **Atentigo al la amikaro de Micky Luthi**

Ni atentigas ĉiujn amikojn de Micky Luthi, ke la movado *Institution JEAN*, sub la titolo "*Hommage à Mathilde Luthi*", publikigis la biografieton verkitan de ŝia fratino Yvonne Richard kaj la funebran omaĝon de Marilou Münger. Kiuj ŝatus akiri tiun 5-paĝan franclingvan dokumenton,